

Leterkesto 9.

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 1990-013-B-3

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo90-013/SRI-1990-013-B-3-Claude-GACOND-Leterkesto-IX.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia. Kiel ni diris en la pasintaj elsendoj, ni ricevis mesaĝojn el 36 landoj de 166 aŭskultantoj kaj ni respondas al tiuj afablaj skribintoj laŭ la alfabeto de ilia familia nomo.

Ni salutas Ray PERSON en Didcot (Britio), kiu regule raportas pri siaj aŭdoj, Benoît PHILIPPE en Singen am Hohentwiel (Germanio okcidenta), Vlasta PIŠTIKOVA en Praha (Ĉeĥoslovakio), kiu estas respondeculino pri administraj aferoj de Ĉeĥa Esperanto-Junularo; ŝi raportas pri du sukcesaj renkontiĝoj. 25 esperantistoj el Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio, Germanio okcidenta kaj Hungario partoprenis al Vina Seminario okazinta 150-metrojn subtere en karbominejo de la sudmoravia urbeto Straznice.

A.- "Ni spertis raran okazon viziti karbominejon, profunde enteriĝi kaj post 2-kilometra migrado eĉ vidi laboron de min-kompanio. Ĉion priparolis per interesa rakonto mineja inĝeniero. Du vesperojn la partoprenantoj travivis en vinkeloj. Do plejparte ankaŭ sub la tero, sed ne nur por trinki bongustajn vinojn, ĉar okazis fakaj prelegoj pri vino atente aŭskultataj. La riĉa programo inkluzivis du duontagajn busekskursojn. La partoprenantoj vizitis la kastelojn en Milotice kaj en Straznice, naturan rezervejon, aŭdis prelegojn kun diapozitivaj pri popolaj tradicioj, folkloro kaj muziko. Sabate ĉiuj ĝuis trihoran koncerton de cimbala muziko en la vinkelo.

Cl.- La dua aranĝo grupigis okdekda alvenintojn el Ĉeĥoslovakio, Germanioj okcidenta kaj orienta, Hungario kaj Pollando. Tiu junulara semajnfino aŭspiciita de la naturprotektista klubo Aqualica malkovrigis vidindaĵojn de Praha kaj de ties ĉirkaŭaĵo.

A.- Informojn pri similaj okazantaĵoj oni petu al Junulara sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-110 01 Praha 10, Ĉeĥoslovakio. Mi ripetas kun literumo.

Cl.- Creta POPOVA en Perniu, Bulgario skribis:

A.- "Mi ŝatus ricevi specimenan numeron de la revuo "Literatura Foiro". Kun vera plezuro mi regule aŭskultas viajn esperanto-elsendojn. Ĉu ne eblas, ke vi plilongigu ĝian tempodaŭron? Ekzemple je duonhoro?"

Cl.- Nia respondo nur povas esti, ke ni sendos specimenan numeron de "Literatura Foiro" kaj ke la elsendodaŭro estas tre verŝajne intime ligita al la nombro de la ricevotaj korespondaĵoj. F. W. POPPECK en Oberkirch (Germanio okcidenta) ne plendas pri la nova elsendotempo. Ni citas lin:

A.- "Kvankam mi ne povas regule aŭskulti viajn elsendojn, mi tamen estas kontenta, ke ili okazas posttagmeze, ĉar mi kiel pensiulo havas tempon por aŭskulti. Vespere ni kutime sidas antaŭ la televidaparato aŭ partoprenas iun kunvenon de societo aŭ troviĝas en amika rondo. Tiukaze ni ne emas interrompi por aŭskultado de radioelsendo."

Cl.- Tutcerte multaj personoj, ĉefe emeritoj, troviĝas en la sama situacio. Estas bone, ke niaj elsendoj disaŭdiĝu ne en la tempo de la rigardado de televidaj elsendoj aŭ de kunsidoj. Otto PRYTZ en Oslo (Norvegio) tiel raportas pri si :

A.- "La sabatajn programojn mi aŭskultas same la por-eŭropan kiel la transkontinentajn. La aŭdebleco eĉ estas pli bona por transkontinentaj elsendoj ol por la eŭropaj. La enhavo de la ĵaŭdaj/sabataj elsendoj ĝenerale tre plaĉas al mi. Tre interesis min la elsendoj pri la judeco de Zamenhof, ĉar ili donis al mi informojn, kiujn mi antaŭe ne konis. Ankaŭ la programoj pri Edmond Privat ŝajnas al mi valoraj... Ankaŭ la prelegoj de Andy KŬNZLI pri orient-eŭropaj temoj interesis min... Fine mi deziras, ke vi baldaŭ havu je via dispono iom pli da tempo, ĉar estas evidente, ke vi ne povas kontentige elĉerpi kiun-ajn temon en nur dek minutoj."

Cl.- Riitta PULLI en Kangasala (Finnlando) informas nin pri la Kvinpinta Semajno, kiun ŝi organizos de la 23-a ĝis la 29-a de julio en facile atingebla loko de suda Finnlando. La esprimo kvinpinta estas simbolo de la kvin nordiaj landoj. En la programo: prelegoj, teatra prezento, koncertoj, ekskursoj, freneza tago, ktp.

A.- Interesatoj petu la informilon al Riita PULLI, Kulkustie 3 B 14, SF-36240 KANGASALA, Finnlando. Mi ripetas kun literumo.

Cl.- Saluton al Gaston RIERA en Parizo (Francio), al Raymundo Esteban RODRIGUEZ MONDRAGON en Oaxaca (Meksikio), kiu aŭskultas niajn merkredajn kaj sabatajn elsendojn. Li estas 17-jaraĝa, eklernis esperanton antaŭ unu jaro kaj serĉas korespondantojn. Jen ni donas lian nomon kaj adreson, por ke korespondemuloj povu kontakti tiun meksikianon:

A.- "Raymundo Esteban RODRIGUEZ MONDRAGON, Calzada de la Republicca 118, 68080 OAXACA, Oax, Mexico. Mi ripetas kun literumo.

Cl.- Saluton al Ludwig RÖLL en Günzburg (Germanio okcidenta), kiu sendas tre regule utilajn aŭdraportojn, al Lorenzo ROSATI en Rocca Priora apud Roma (Italio), al Camille ROUGET en Cogners (Francio), al Jean RUFER en Bern (Svislando), al Egon RUSA en Tann (Svislando) kaj al Vilmos SÁGI en Székesfehérvár (Hungario), kiu skribis:

A.- "Mi ĉiam klopodas kapti viajn objektivajn kaj interesajn elsendojn. Bedaŭrinde ilia emisia tempo kelkfoje koincidas kun mia labortempo."

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond daŭrigos la salutadon al la geaŭdantoj la venontan semajnon. Ĝis reaŭdo!

Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), decembro 2012